Zone €uro - €ŭroejo : 3,50 €
Autres pays - Aliaj landoj : 4,50 €

Organe de l'Union des Travailleurs Espérantistes de langue française

La SAGO
La SAT-Amikara GazetO

*Espéranto : vers une culture sociale sans frontières*
*Esperanto : al senlima socia kulturo*

sat-amikaro.org

Bimestriel - Dumonata
166
Marto-Aprilo 2026

# Partopreni al Kongres'

## VORTO DE LA PREZIDANTO

De la 4a ĝis la 6a de aprilo 2026 okazos la 78a kongreso de SAT-Amikaro. Venu multnombraj en Greziljono, unu el niaj karaj Esperanto-kulturdomoj en Francio (la alia estas Kvinpetalo, kie SAT-Amikaro ankaŭ iam kongresis) !

En tiu kongreso, estos tempo por elekti novajn komitatanojn. Tio nepre necesos, kiel tion jam klarigis Solange kaj Lumeto. Mi mem ne povos denove kandidatiĝi. Kompreneble, mi plu laboros por SAT-Amikaro, sed ne plu kiel ano de la Komitato, kaj do ne plu kiel prezidanto. Mi daŭrigos ankoraŭ dum kelka tempo plenumi la taskojn, kiujn mi plenumis ĝis nun :

- instrui Esperanton al la interesatoj kiuj ĉirkaŭas min, provante allogi ilin al SAT-Amikaro kaj SAT, - reprezenti SAT-Amikaron en FEI (Franca Esperanto Instituto

- kaj en la Administra Komitato de Greziljono.

Pri la aliaj taskoj mi devas bedaŭrinde rezigni pro manko de forto, tempo kaj energio, despli ke fakte mi ne plu plenigas ilin jam de pli ol unu jaro !

La klasbatalo de la riĉuloj kontraŭ la malriĉuloj, de la povposedantoj kontraŭ la pli kaj pli senpovaj salajruloj bedaŭrinde daŭras. Tiu klasbatalo estas pli mortiga en iuj regionoj de la mondo ol en aliaj, sed ĉie la vivkondiĉoj povas ankoraŭ malpliboniĝi. Necesas senĉese batali por limigi la maljustecon, eĉ en « trankvila » lando kia Francio !

Do ni, SAT-Amikaranoj pli ol iam ajn antaŭe devas renovigi niajn fortojn, per elekto de homoj, kiuj pli efike utilos por plenumi la taskojn necesajn, kaj por kreskigi nian nombron.

Bone zorgu pri vi kaj pri via sano, por via feliĉo, kaj por efika agado en nia asocio : ne timu kandidatiĝi por agadi ankaŭ en nia Komitato ! ■

Ansofio

**SAT-Amikara kongreso**

**4-an ĝis 6-an aprilo 2026 Pasko Greziljono**

**Aliĝu ! restas sidlokojn**

# POUR LA PAIX

*Éric ÉLIARD*

Nous sommes tous ici pour dénoncer le militarisme, la guerre, et appeler à la paix. Cet idéal de paix, les espérantistes le portent depuis plus d'un siècle ; ils prônent l'usage d'une langue auxiliaire commune : l'Espéranto.

Cette langue, facile, selon la volonté de son inventeur le docteur Zamenhof, a pour ambition de rompre les murs entre les nations, entre les humains en détruisant les barrières des langues. L'Esperanto est une technologie de paix.

Certes, une langue universelle ne suffira pas à elle seule à concrétiser cet idéal, mais nous savons que l'Espéranto peut y contribuer en partant de l'évidence qu'un Français, un Allemand, un Russe, un Ukrainien n'ont a priori pas de raisons de s'entre-tuer. Comment peut-on convaincre un Français, un Russe, un Allemand, un Ukrainien, un Palestinien, un Israélien, d'en arriver à haïr, à violer, à torturer, à tuer ?

La réponse vous la connaissez, c'est le nationalisme.

« Le nationalisme c'est la guerre »

Ce poison du nationalisme, Zamenhof, et à sa suite des espérantistes l'ont combattu, notamment Eugène Lanti et l'association SAT "Sennacieca Asocio Tutmonda" ou Association Anationale Mondiale, au lendemain de la 1ère guerre mondiale. Aujourd'hui lors de ses congrès cette association appelle à l'arrêt des conflits : en Ukraine, en Palestine, au Yémen, au Soudan… Elle reconnaît le caractère génocidaire de la guerre israélienne contre Gaza. Elle condamne les exactions perpétrées au Nord-Kivu par les groupes rebelles du M23 appuyé par les états voisins. Elle appelle aussi à l'interdiction des armes nucléaires.

Les espérantistes voient loin. À long terme, la paix sera portée par l' éducation à la citoyenneté mondiale dès le plus jeune âge.

C'est dans cet état d'esprit qu'en 1928 un jeune travailleur espérantiste, Lucien Péraire, est parti en vélo faire le tour du monde « par » et « pour » l'Esperanto : https://peraire.huma-num.fr/fr. Grâce au réseau des espérantophones il a pu rencontrer toutes sortes de gens, de toutes origines géographiques ou sociales. S'il lui est arrivé de rencontrer des personnes racistes et haineuses, et spécialement en Indochine Française, ce sont surtout des gens ordinaires, hélas trop souvent trop peu conscients et responsables, qu'il a rencontrés.

L'Espéranto, langue anationale s'oppose par essence à tous les nationalismes. Les dictateurs l'ont bien perçu et ce n'est pas pour rien que des Espérantistes ont été persécutés par Hitler, Staline et autres dictateurs, ou encore, ce qui porte à rire, si l'Espéranto fut « la langue des agresseurs » lors des grandes manœuvres de l'armée des États-Unis d'Amérique du Nord en 1962.

Aujourd'hui ce n'est pas sans raison si les nations dites démocratiques se livrent à l'impérialisme du « tout anglais » en ignorant la solution la moins coûteuse et la plus démocratique : l'Espéranto.

Dans ces conditions, privé de moyen, non reconnu la plupart du temps dans les enseignements officiels, l'Espéranto, plus de 130 ans après sa création, reste bien présent et bien vivant, ici même à Paris, et dans la plupart des pays du monde, et même dans des endroits où l'on n'imaginerait pas qu'il puisse se développer, comme : dans la région du Nord-Kivu en République Démocratiques du Congo, l'un des lieux les plus violents au monde.

Aujourd'hui comme hier, l'Espéranto est présent dans le monde de manière pacifique, en dehors de tout système, de subventions officielles, et cela par le simple acte volontaire de ceux qui l'apprennent et le mettent en usage.

Une des forces de l'Espéranto, c'est sa facilité d'apprentissage, qui met directement en pratique l'égalité, par le fait de se parler d'égal à égal, quelle que soit la situation sociale des interlocuteurs, leur pays, sexe ou couleur de peau. L'Espéranto, ce n'est pas l'anglais ; l'Espéranto ne porte aucune composante impérialiste ou mercantile.

Lorsque demain vous ferez le choix d'apprendre l'Espéranto, vous n'en recevrez pas plus de « like », vous ne porterez pas de Rolex, vous ne roulerez pas forcément en Tesla, et cela ne vous servira à rien sur la planète Mars…

… mais vous aurez le sentiment de devenir un peu plus citoyen du monde, et vous ferez avancer la paix et l'égalité entre les humains. ■

# COMPTE DE RESULTAT et BILAN
# SAT-Amikaro au 31/12/2025

*Solange VAN LANDEGHEM*

# COMPTE DE RESULTAT

| ACTIF | | | | | PASSIF | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **Nature** | **Brut** | **Amortissements et Provisions** | **Net 2024** | **Net 2023** | **Nature** | **Net 2024** | **Net 2023** |
| Immobilisations | | | **62732,85** | **76779,09** | Fonds associatif et réserve | **210454,42** | **244975,65** |
| Constructions | 298548,17 | -268784,48 | 29763,69 | 44069,96 | | | |
| Matériel, Mobilier, Agenceme | 19903,87 | -19811,32 | 92,55 | 620,95 | Fonds associatif | 178392,46 | 214538,44 |
| Prêts | 24975,00 | | 24975,00 | 24975,00 | Résultat de l'exercice | -13679,34 | -15564,09 |
| Titres de Participation | 7901,61 | | 7901,61 | 7113,18 | Caisse de solidarité | 11708,28 | 11708,28 |
| Dépôts et Cautionts | | | 0,00 | 0,00 | Dotation Congrès | 1496,74 | 1756,74 |
| | | | | | Fonds réserves nouvelles éditions | 32536,28 | 32536,28 |
| Stocks | | | | **58283,58** | | | |
| Stock Librairie | 116234,97 | -59261,34 | **56973,63** | 58283,58 | | | |
| Produits à recevoir | 0,00 | | 0,00 | 4308,17 | | | |
| Créances | 0,00 | | 0,00 | 2722,32 | Dettes | **2524,00** | **2110,50** |
| Avance Fournisseur | 7347,78 | | 7347,78 | **0,00** | Adhésions à vie | 1230,00 | 350,00 |
| Disponibilités | | | **85924,16** | **104992,99** | Abonnts perçus d'avance | | |
| LBP (La Source) | 3890,78 | | 3890,78 | 2783,08 | Adhésions perçues d'avance | 1294,00 | 1395,00 |
| LBP (Libroservo) | 2040,31 | | 2040,31 | 3497,11 | Dettes Fournisseurs | 0,00 | 365,50 |
| Compte UEA | 1816,91 | | 1816,91 | 2013,85 | | | |
| Compte autre (Paypal) | 0,00 | | 0,00 | 0,00 | | | |
| Compte Livret LBP | 8983,10 | | 8983,10 | 842,80 | | | |
| La Nef | 69039,84 | | 69039,84 | 95759,31 | | | |
| Caisse | 153,22 | | 153,22 | 96,84 | | | |
| **TOTAL** | **560835,56** | **-347857,14** | **212978,42** | **247086,15** | **TOTAL** | **212978,42** | **247086,15** |

# BILAN

| CHARGES | | | PRODUITS | | |
|---|---|---|---|---|---|
| **Nature** | **2025** | **2024** | **Nature** | **2025** | **2024** |
| Achats Librairie | 805,14 | 1928,20 | Ventes librairie | 4850,09 | 4886,61 |
| Variation des stocks | 1048,59 | 261,36 | Formation | 10,00 | 16,00 |
| Revue : impression et envoi | 7377,84 | 9146,31 | Abonnements | 2445,00 | 2112,00 |
| Frais bancaires, postaux,téléphone | 929,09 | 1004,88 | Adhésions | 2627,00 | 1906,50 |
| Locations et entretien copropriété | 3504,31 | 5389,23 | Dons manuels | 1493,00 | 960,00 |
| Fournitures de bureau et bibliothèque | 117,90 | 491,79 | Subvention Serv.Civique | | |
| Assurances | 1166,07 | 1026,20 | Cotisations congrès | | 3529,00 |
| gaz,électricité | 1991,62 | 2128,50 | Don congrès Vigy | 287,85 | |
| Déplacements | | 111,00 | | | |
| Impôts locaux | 1033,67 | 1188,05 | | | |
| Congrès | 180,00 | 2954,50 | | | |
| Rémunérations d'intermédiaire | 522,00 | 200,00 | | | |
| Redevances | 327,47 | 709,15 | | | |
| Pertes créances irrécouvrables | | | | | |
| Utilisation Solidarkaso | | | Dons à solidarkaso | | |
| Utilisation Fonds congrès | | | Dons à fonds congrès | | |
| Cotis.et Subv. Associations | | | Produits Financiers | 1085,69 | 308,75 |
| Personnel bénévole et Déplacements | 26348,00 | 27734,00 | Bénévolat et prestations nature | 26910,60 | 28092,40 |
| Personnel bénévole et Déplacements | 562,60 | 358,40 | | | |
| Résultat d'exploitation-positif | | | Résultat d'exploitation- négatif | | |
| Charges exceptionnelles | 2722,32 | | Produits exceptionnels | 2717,70 | |
| Dotation de solidarkaso | | | Reprise sur dotation solidarkaso | | |
| Dotation de Fonds congrès | | | Reprise sur dotation fonds congrès | | |
| Dotations aux amortissements d'immo. | 7469,65 | 7761,58 | Rep.fonds réserves nouvelles éditions | | |
| Dotation dépréciation stocks | | | Reprise sur dépréciation stocks | | |
| Bénéfice | | | Perte | 13679,34 | 20581,89 |
| **TOTAL** | **56106,27** | **62393,15** | | **56106,27** | **62393,15** |

# SAT AMIKARA AGAD RAPORTO 2025

*Lucette Échappé'*

**Sidejo** : dank' al kelkaj parizanoj ekz Ĵerar, Regis, … la ekstera ŝildo nun estas tute bela, tute riparita,
Sed, sajnas ke neniu pli eniras nian sidejon kaj ĉefe ne aĉetas,

**Kursoj** :

| | | | |
|---|---|---|---|
| Elisabeth instruas al | 4 | komencantoj | lunde |
| | 3 + 1 | tradukas en ateliero | jaŭde |
| | 2 | mezniveloj | vendrede |
| | 5 | progresantoj | sabate |

**Babil-rondoj** tre regule okazas ĉiun vendredon ekde la 18a kaj duono kaj daŭras ĝis proksimume la 23a

**Zamenhof festo** : Pariza Zamenofa Festo 2026 de HopO

**Budoj, eksteraj rilatoj,** la SAT-Amikaraj Parizanoj partoprenis :
- forumo de asocioj de la kvartalo 13a,
- 11an de novembro ĉe Placo de la Respubliko kun kelkaj aliaj asocioj. Ili deĵoris je budo por peti PACON en la tuta mondo

**FEI -ekzamenoj :** en Vigy, 2 lernantojn, sukcese, trapasis ekzamenojn

**Multaj membroj agadas regione:**

Solange Vanlandeghem jam raportis pri siaj aktivaĵoj, ekz pri,"Ville à Joie" ( cf pasintaj La Sago-n ; ŝi ankaŭ regule kunigas kelkajn esperantistojn por praktiki la lingvon.

Marielle Giraud faciligas ligojn kun ĉiuj esperantistoj en Bretonio

Françoise Guihaumé kaj Frank Mintz, daŭre reprezentas Sat-amikaro-n por Le Mans kaj regiono

Bruno Henry, kun aliaj esperantistoj regule, ĉiusemajne aktivas en Alsaco

Jacqueline Lepeix kaj Reno B. kunvenigas kelkajn aliajn personojn ĉiumonate, en Klermonto

Pierre Grollemund - kiel antaue vi legis-, ĉiun jaron sendas regionan raporteton pri agado en St Etienne

Roland Platteau en Arras gastigis pere de Pasporta servo familion el Ukrainio
ankaŭ nun havas kelkajn kontaktojn kun junulo kiu komencas lerni

Isabelle Nicolas reprezentas Sat-amikaro-n ĉiusemajne en Limoges

Virginia Krikru ekzemple "la dancontaj musoj" koncertis en Die 26 kaj Marseille

Bone, se same kiel Pjero Grollemund vi sendas raporteton pri aktiveco en via regiono por enmeti en La Sago-n

**Kongreso en Vigy** vigla, agrabla etoso bone organizita de Bruno HENRY kaj ĉeesto de Jean Luc Thibias.

**Sendo de materialo al afrikanoj** : ne okazis ĉijare ĉar niaj afrikanaj amikoj petis nenion ; sajnas ili turnas sin al lokaj lingvoj ekz Svahila malagasa lingvo, ktp

**Reto :** Dank' al cerbumado de Jean François BLIN, kiam vi skribas **''sat-amikaro.org''** vi tuj alvenas al duobla paĝo de freŝaj informoj
Lucette iom nutras facebookan paĝon, kaj instagram

**La Sago** : fakte aperas regule, multe helpas nin Janine DUMOULIN kaj Patrick LAGRANGE por eviti erarojn
Duan fojon Jean François Blin starigis belan kalendaron, kiel vi vidis, Ankaŭ li povus refari por sendi al vi ''vizitkartetojn''. ■

# PARIZA ZAMENHOFA FESTO 2025

*HopO'*

Sabate 13an de decembro, la tri Parizaj Asocioj: Esperanto Paris Ile de France, SAT-Amikaro kaj Franca Fervojista Esperanto Asocio kunorganizis Zamenhofan feston en Salono Traversière, proksime de Fervoja stacio : Gare de LYON. La programo havis 2 partojn.

En la unua estis amatoraj artistoj nome : Dancistinoj el fervojista grupo de Gare Montparnasse prezentis "Hawajaj" dancojn, Elizabeth Barbay kun sia gitaro el SAT-Amikaro kantis du kanzonojn , poste sekvis prezentado da filmetoj ankaù de SAT-Amikaranoj.

Sekvis ludo kun la publiko, Raymonde membro de SAT-Amikaro kaj Esperanto Paris Ile de France disdonis al kvin ĉeestantoj duan parton de proverbo: ekzemple: tie fajro troviĝas, kaj kiam ŝi proponis : Kie fumo leviĝas, tiu kiu havis la paperon: tie fajro troviĝas, levis la manon kaj citis tiun duan parton de la proverbo, evidente, ne nur tiu kiu havis la paperon sciis la respondon, kaj krome oni tradukis en franca lingvo ĉar estis kelkaj ne esperantistoj kaj akompanantoj de artistoj. la venonta programero estis dua prezento de dancistinoj : "Boliwoodaj" dancoj kun mirindaj kostumoj.

Poste estis la koruso "Chorale de Lutèce" kiu krom sia repertuaro en franca, angla, speciale por Zamenhofa festo interpretis kanzonon de franca kantisto Georges Brassens en Esperanta versio: Kanto por la kampul'. Iam estis momento por paùzo: oni povis trinki kaj manĝeti che la trinkejo prizorgita de Esperanto Paris Ile de France , aĉeti koverton po 2€ por gajni iun premion de la loterio prizorgita de F.F.E.A.

Poste la ĉefa programero estis la koncerto de famkonata Toulouza artisto JoMo invitita de Esperanto Paris Ile de France kiu regalis nin dum unu horon pri diversaj muzikstilaj kanzonoj.

Tiel la ĉeestantoj travivis agrablan posttagmezon. ■

La SAGO
La Sat-Amikara GazetO

CPPAP n° 0626 G 86224
ISSN : 1763-1319

**Revue bimestriel de SAT-Amikaro**
132/134, bv Vincent-Auriol, 75013 Paris
Tel. : 0 (0 33) 9 53 50 99 58
sekretario@sat-amikaro.org
**Retejo** : sat-amikaro.org

*Directeur de la publication et Ĉefredaktanto :*
Lucette ECHAPPÉ
*Imprimé par :*
L'Arbre aux Papiers, 72100 Le Mans
Dépôt légal à parution.
*Enpaĝiganto :* Jean-François BLIN
*Redakt- kaj kontrol-skipo :*
Patrick LAGRANGE, Anne-Marie ARGNEY
***Kasistino* : Solange VAN LANDEGHEM**
12 rue de Charente, F-18 000 BOURGES
*kasisto@sat-amikaro.org*

| **Tarifoj** | **Be, CH Fr** | **Aliaj landoj** |
|---|---|---|
| Kotizo (kun abono 60%)<br>*Cotisation (avec abonnement)* | 42,00 € | 52,00 € |
| Kotizo sen abono<br>Cotisation sans abonnement | 21,00 € | 26,00 € |
| Abono al la SAGO (nur)<br>*Abonnement à la SAGO (seul)* | 45,00 € | 45,00 € |
| Junulo (malpli ol 25 jaroj), senlaborulo, kunul(in)o | 20,00 € | 25,00 € |

**IBAN** : FR32 2004 1010 1237 8529 0L03 314 BIC : PSST FRPPSCE

(indikante al kio kaj al kiu rilatas la pago ;
*en indiquant l'objet et le bénéficiaire du paiement*)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto.

# Agad-raporto de la Klubo ESPERANTO de St-Etienne

*Pierrot GROLLEMUND*

Ĉu la esperanta vivo bone fartas ? En kelkaj landoj de la mondo eble. Sed en Francio tute ne certas ! La kunteksto en nia Eŭropa Unio ne estas favora ! Pro la milito en Ukraino homoj de eŭropaj landoj turnis sin al « onklo Usono » - kaj malreviĝas pro la forlaso de Trump !

Multaj diras al ni, ke lerni lingvojn nuntempe ne utilas, ĉar nun estas rimedo por tuja aŭtomata tradukado ! Mi vidis afablan fremd-devenan virinon (kiu iom bone lernis la francan) barakti por kompreni artikolon en serioza franca gazeto: Ŝi tuj trovis rimedon, elpoŝigis sian *kompufonon*[1] per kiu - dank al speciala programo - ŝi legis la tradukaĵon rekte sur l'ekrano de sia aparato : (se vi jam vidis tion : la kompufono « legas » la francan tekston, ĝin aŭtomate tradukas kaj la kliento legas la tradukaĵon ! Mirinde, ĉu ne ?)

Tamen, nia lingvo esperanto plu interesas gehomojn, ne nur la maljunajn! ĉar ĝi alportas tutmondan perspektivojn en vojaĝoj, homaj rilatoj, kaj portas mesaĝon de Paco -kio estas vere nepra nuntempe ! ktp ! Restas la tasko konvinki !

Tian aspekton ni provas disvolvi en nia urbo kaj ĉirkaŭaĵoj : departamentoj 42 (Loire) kaj 43 - per niaj malfortaj rimedoj.

**Ekstera agado por konatigi esperanton** : Ekzemple, ĉiu-jare, ni tenas esperanto-budon en Salono Tatou Juste (kiel la fama salono Primevère en Lyon, sed malpli granda) Ni povas diri, ke la lingvo ESPERANTO montras sin almenaŭ unufoje jare ! Kelkaj vizitantoj malkovras nian lingvon kaj eĉ ne sciis, ke ĝi ekzistas ! Aliaj interesiĝas, konservas niajn flug-folion por rekontakti nin poste… kaj ne plu donas novaĵojn ! Estas tiel !

Plie, ni ofte donas la kalendaretojn provizitajn de Esperanto-France, **ankaŭ ni povos doni 'vizitkartojn' de SAT-Amikaro**.Tre utilaj, ĉar donante ĝin, ni havas eblecon rapide diri pri kio temas : Jes *ni plu estas en tempo de informado* pri la lingvo ! Nepre necesa unua paŝo.

**Interna vivo de la asocio ESPERANTO 42 / 43 :** Niaj membroj estas disigitaj en urboj, kamparo kaj areoj de la du departamentoj. Ni **kunvenas** ĉiu-semajne sur la retejo JITSI , ĵaŭde je la 19a horo. Sen tio, la kluba vivo estus delonge mortinta ! Por tio, ni preparas dokumentojn, kujn ni kundividas. Tio ebligas diskutojn, paroladojn, perfertiĝadon. Ni sendas al 22 personoj, el kiuj nur 12 lokaj kotizantoj kaj de tiuj nur 4 ĝis 8 partoprenas la kunvenojn. Jam estas bona rezulto kompare al aliaj ! En la pasintaj jaroj, ni kunvenis regule je 33 semajnoj (el 52 !) La lingvo-nivelo pliboniĝis precipe dank'al nia fama ludo « **La 5 vortoj** » - fama por ni ! Ni prenas por la venonta semajno 5 vortojn, hazarde elektitajn per kiuj ĉiu klopodas fari mallongan rakonton. Kvankam estas samaj vortoj, la rezulto estas ofte tre malsimila, kaj amuza !

Ekzemple : **kanajlo** **tinuso** **aserti** **malsupreniri** **malagrablege**

De ***R*** : Ĉu vi volas , ke mi diru al vi kiel eviti **malagrablege malsupreniri** la ŝtuparon kun tiu ĉi fanfarona maljuna **kanajlo**, kiu fiere **asertas**, ke la haŭto de ŝarko estas multe pli raspa ol tiu de **tinuso** ? Kaj tamen li pravas : tio estas vero. Estas alia versio…

De ***P*** : Estas **malagrablege** manĝi putritan **tinuson,** kiun trompema **kanajlo asertas** bona ! Li prefere **malsupreniru** en sian kelon por spriri la fetoron !

De ***C***: Mi povas **aserti** vin, ke se mi konus la **kanajlon,** kiu metis kapsikon en mian skatolon de **tinuso,** li **malsuprenirus** la ŝtuparon tre rapide kaj tre **malagrablege.**

De ***M*** : Kia **kanajlo !** Malgraŭ ke li **malagrablege asertas** ne fiŝkapti ruĝan **tinuson**, la marborda gardisto vidis lin. Li vidis la teruran scenon : la **kanajlo malsupreniris** sub la ŝipo kaj per harpuno, **malafable** mortigis la **tinuson** en maro de sango".

Plie, ni aŭskultas tekstojn ĉerpitajn de UEA Facila ; **plie ni povus uzi filmetojn sur yutubo – skribante ‘’lernu esperanton with subtitles”**– tre bona trejnado por aŭd-**komprenado ! Aŭ** tradukas tekstojn, aŭ komentas dialogojn, ktp, ktp. Bonega etoso !

Ni intencas proponi al SAT-Amikaro kaj Esperanto-France (kaj poste al ne franclingvaj asocioj) kompiladojn de niaj ‘’*produktoj*”, disponeblaj sub formato EPUB (tre praktika por kompufonoj kaj elektronikaj legiloj (liseuses)

**Abonoj** : kelkaj personaj abonoj al esperantaj gazetoj : La SAGO ; ESPERANTO-INFO ; MONATO, ks[3]. Nia klubo aparte abonas La SAGOn. Ni vere devas kuraĝigi novajn membrojn legi esperantan legaĵojn kaj literaturon ! (ne facile)

**Internacia vivo** : Krom Pierre (la redaktinto de tiu raporto, membro de SAT-Amikaro kaj sekretario de konstruista asocio TAKE) nia klubo vidas ĉiu-jare vojaĝantojn kiuj partoprenas kongresojn : 5 en Torino (2024) 5 en Strasburgo (2025) kaj 1 en Brno (2026) Plus partoprenoj en regionaj renkontoj : Vigy (2025) Métabief, Grésillon. Ne multe, sed ne neglektinde !

Kelkaj el ni konservas **siajn korespondantojn.** Sed, rimarku ni, ke la koresponda servo iom lamas nune : tre bedaŭrinde, ĉar nur per internacia (ne franc-lingvia) interŝanĝoj novuloj povas pratiki esperanton !

Ni ankaŭ klopodas iel helpi esperantistojn en la mondo. Ekzemple, helpante niajn afrikajn amikojn de Goma (RDC) pagi la stud-kostojn de infanoj kaj studentoj. Tie for plu regas terura milito (kaŝita de amas-informiloj) por ŝteli la lokajn riĉajn mineralojn !

**Konkludo :** Ni povas iomete fieri pri nia ekzisto kaj vivo. En la regiono nur Lyon kaj Grenoble havas similan viglecon ! Sed ni konscias, ke restas multege da farotaj agadoj, precipe en informado kaj varbado. Ni konfesas, ke ni ne sufiĉe uzas la « *sociajn retojn* » - Ni volonte legus proponojn, rimarkojn, kritikojn, jes ja ! ■

Notoj : 1/ **kompufono** anstataŭ ‘’smartphone” kaj aliaj usonaj stultaĵoj, ekzistas delonge en esperantujo. En la franca, mi trovis « Ordiphone » Tute prava kopio de la esperanta termino : ja temas pri aparato kiun oni uzas kiel telefono kaj poŝ-komputilo !


2/ La klubo krom nomita ‘’Esperanto 42/43” ne estas rekta membro de Esperanto-France : 2 membroj pagas kotizon, **sed la pli multo ne havas sufiĉan buĝeton por pagi nacian kotizon, kun promeso de impost-rabato, dum ili ne pagas imposton !**

3/ Du membroj kotizas nacie al Esperanto-France, sed plu atendas ties gazeton « **Le Monde de l’Esperanto** » Ŝajnas, ke io estas preparata. ■

---



Lucien Péraire fut l’inventeur du « vélo-rail ».
Sur le guidon de son vélo, un mot en Esperanto :
« SENNACIULO », ce qui signifie « Un sans-nation ». ■




Documents fournis par : Éric ÉLIARD

Un document de l’armée américaine :
« Esperanto, the aggressor language ». Ce n’est ni du « complotisme » ni une plaisanterie, simplement un fait révélateur d’un certain état d’esprit. ■

**Foliumu la libreton tie :** https://archive.org/details/FM30-101AAggressortheManeuverEnemyEsperantoLanguage/page/n5/mode/2up


# PROGRAMO
# DUM LA 78-a KONGRESO DE SAT-AMIKARO

**Ĉe Gresiljono  Baugé  Maine et Loire – 49**

**04-a, 05-a, 06-a de aprilo 2026** ( Paska semajnfino)

## Sabato la 4-a

08a matenmanĝo
10a akcepto
**11a** prelego de Ĵakelino pri enmigrantoj
13a tagmanĝo kun la komediistoj
14a30 fotado kun la artistoj
**15a** **video-konferenco kun niaj afrikaj amikoj -pluraj el ili deziras esprimiĝi- (kun paŭzeto)**
19a vespermanĝo
20a akurate Grandega teatra vespero, kun 10 roluloj !!!
kvazaŭ profesiuloj !!




## Dimanĉo la 5-a

08a matenmanĝo
10a *unua laborkunsido : raportoj kaj voĉdonoj*
12a30 tagmanĝo
14a *dua laborkunsido : ĉefe pri estonteco, kaj novaj komitatanoj*
16a prezento de la venonta SAT-Kongreso en Leono (Hispanujo)
**17a** prelego de Pjero Grollemund pri tegmentoj de Gresiljono
19a vespermanĝo
**20h30** dua granda longa vespero : **“ Dancontaj Musoj ” koncertos por ni**



**Chansons dansantes,**
**amusantes poétiques, engagées en Espéranto**
(traduction  française projetée).

Plie, kantante ni OMAĜOS  al Jack  LE PUIL,

## Lundo la 6-a

08a matenmanĝo
**10a** *lasta laborkunsido : sintezo pri la diversaj laboroj, decidoj*
12a30 tagmanĝo
**14a** prelego de Franck pri “ Bakunine ”
16a kuketoj, teo, kafo en varma etoso

**Poste  aparta kunveno de la Komitatanoj**